Il a publié, entre autres: en français, Intégration européenne et pouvoirs des Régions, Munich, Internationales, Institut für Nationalitätenrecht und Regionalismus, 1983; en italien deux volumes sur le Parlement Européen (Ed. Giuffrè, Milan 1981 et Ed. Cedam, Padoue, 1983), ainsi que Mass media e società europea (Ed. Lacaita, Manduria, 1977), La dimensione europea delle autonomie e l'Italia (Milan, Angeli, 1984) et Per un europeismo protagonista (Ed. Palombi, Rome, 1984). En 1987, paraîtra à Rome, chez Armando, son ouvrage La politica d'insegnamento delle lingue nelle Comunità Europee. Stato attuale e prospettive future.

NIA VIVO EN =====NANCY

Duagrada kurso per "M°12" funkcias ĉiumerkrede de la komenco de februaro. Nur 6 gelernantoj el 8 daŭrigas... (M°12 ŝajnas al kelkaj malfacila). Nia supera kurso (preparo al "Kapableco") okazis unufoje ĉiumonate. Partoprenis 3 ĝis 6 personoj. Tri gelernantoj partoprenis la Kulturalan Semajnfinojn en Homburg (Sarlando), la 28/29ajn de majo kaj du la Federacian Kongreson en Mulhouse.

PONT-SAINT-VINCENT (Meurthe-&-Moselle)

En la lernejo de SR° GUILLAUME, kursoj kun entute 15 infanoj (10/11 jaraj) plu funkcias. Krome Sr° Guillaume malfermis kurson kun 4 gekolegoj, kadre de instruista amikaro de la regiono de Pont-St-Vincent.

BAR-LE-DUC

*Nur du lernantinoj daŭrigas sian ĉiusemajnan laboron pere de "Metodo 12". Cetere Florent kaj Séverine (10-jaraj) atingas la finon de la Junul-Kurso. Paralele la 3 kurtimaj geamikoj, kiuj kleriĝas cele trapason de la "Kapableco" efike kaj fruktodone plu laboras.*

*La grupo (parto!) veturis al Gray la 1an de majo por viziti la urbon kaj memevidente la E°-muzeon sub la gvidado de Geo Junier. 5 klubanoj partoprenis ankaŭ la Nacian Kongreson en ROUEN.*

\*\*\*\*\*

PRI NIA PERKORESPONDA KURSO =====

Vi povis legi en "LA INFORMILO" n° 61 raporton pesimistan pri la funkciado de nia Perkoresponda Kurso. Tiu raporto estis verkita la 10an de februaro, kaj feliĉe intertempe la situacio multe evoluis.

Mi ne dissendis pliajn komunikojn al la gazetaro, ĉar la regionaj gazetoj ne ŝajnis enpresi la 2 lastajn seriojn da komunikoj dissenditaj respektive la 23an de novembro kaj la 22an de januaro. Fakte, novembre, ŝajnas, ke nur 2 malgravaj gazetoj enpresis sen videbla rezulto. La januaran komunikon same enpresis nur 3 gazetoj, ankaŭ sen rezulto (venis nur 3 informpetoj de la fino de novembro ĝis la 10a de februaro).

Sed subite, danke al Sin° NAU, "Le Républicain Lorrain" (METZ) enpresis, eĉ dufoje, la lastan komunikon, la 10an kaj la 12an de februaro. Aperis komunikoj en "Dernières Nouvelles" (STRASBOURG) la 2an de marto dank' al Sr° LUDWIG; kaj post pluraj telefonaj petoj, "L'Est Républicain" (NANCY) enpresis finfine 3 monatojn post la dissendo, t.e. la 20an de aprilo!

Rezulto: venis 47 pliaj informpetoj, el ili 17 novaj gelernantoj aliĝis. Nun la kurso funkcias kun 33 gelernantoj (lastjare samdate 35). La situacio estas do tre simila.

Kiel lernas tiuj homoj? Februare, jam unu -ino finlernis M°11 (Sin° Joëlle MARCHAL, Epinal, gvidita de Sr° CLAUDEL). Nun 4 pliaj aldoniĝis: Sr° Michel LEHERICEY (57660 BIDDING) kaj Sin° Mireille ANTONI (57160 LEXY), ambaŭ gviditaj de Sin° BUSSER (Sr° Jean REINERT (57050 PLAPPEVILLE), gvidita de Sr° GREINER. Fin° Marie-Odile GANTER (STRASBOURG), gvidita de Sr° WICK.

Gratulojn al ĉiuj finlernintoj kaj al iliaj gvidantoj. Ĉiuj tiuj gelernantoj tuj aliĝis al M°12; nur 3 deziris korespondi.

RIMARKO: pro stulta ŝanĝo en la regularo de Poŝto, mi estas devigata sendi la kursojn en Meurthe-&-Moselle laŭ la tarifo "rapida". Ĉar ne eblas starigi 2 tarifojn (la pli kostan por la pli proksimaj personoj!), ĉiuj pakajoj estos de nun afrankitaj laŭ la tarifo "rapida". Bonvolu noti, ke la kurskotizo estas de nun 170F kun nur la libro, aŭ 225F kune kun la kasedo. Nova altiĝo okazus aŭtune, se la abono al LA INFORMILO aŭ la prezo de la kurslibroj altiĝus. (Mi skribis grumblan leteron al la Ministro pri Poŝto por protesti kontraŭ tiu stultajo!).



Claude GACOND?... Direktoro de la KULTURA CENTRO ESPERANTISTA (K.C.E.) en LA CHAUX-de-FONDS (CH), Redaktoro ĉe SVISA RADIO INTERNACIA por la Esperanto-fako, arkivisto de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia, kursprogramisto kaj metodologo, preskaŭ konstante instruas Esperanton al lernantoj el ĉiuj mondpartoj.

En tiu didaktika aktiveco li konstatis, ke la grek-latina gramatika terminologio ne nur ne estas tre favora al la ellernado de la okcidentaj lingvoj, eŭropaj, latinidaj kaj germanaj, sed ke koncerne al la ellerno de Esperanto ĝi estas nebuliga kaj erariga. Tial tiom da lernantoj stagnas je meznivela lingvo-praktiko, baraktante senespere por distingi la transitivajn verbojn de la netransitivaj (la "ig-ig-problemo"), por korekte uzi la akuzativon, la afiksaron, ktp.

Montriĝis, ke objektiva lingva priskribo multe helpas ĉiujn ekkompreni kiel reale funkcias Esperanto. Amuzaj ekzercoj, lingvaj diskutoj kaj prezento de la aktiveco de Kultura Centro Esperantista agrabligos tiun prelegon, kiu tutcerte malfermos al ĉiuj novajn horizontojn entuziasmigajn.

## ANGULO DE LA PREZIDANTO

Dum la Federacia Kongreso en MULHOUSE -koran dankon al la tieaj samideanoj pro la agrabla etoso kaj la bona organizado- ĝojigis min io: kvankam nur dudeko da samideanoj ĝin ceestis, ĉiuj ceestintoj estis aktivuloj, kiuj respondecas, aŭ pri grupo, aŭ pri difinita tasko en la Federacio. Al ĉiuj mi rediru ĉi-tie mian plej sinceran dankon pro la farita laboro. Mi ne citos nomojn pro la risiko forgesi iun, sed mi konfesas, ke mi estas fiera estri Federacion, en kiu ne mankas la laborantoj.

Al ĉiuj aliaj, kiuj ne povis veni, mi diru: helpu ilin! Nia celo estu: "krei la eventon!" Tio estas organizi kunvenojn, diskutrondojn por gelnantoj de la perkoresponda kurso, grupkunvenojn pri difinita temo, migraĵojn, staĝojn, ktp.

Afable akceptu la demandojn de la respondeculino (Odette SCHEIDEL), kiu informiĝos pri viaj realigoj!

Ek al la laboro!

Edmond LUDWIG

## NOVA KOMITATO DE NIA FEDERACIO

BARRIER Etienne	1	35, Rue de Heimsbrunn, HOCHSTATT, 68720 ILLFURTH
COLNOT Jean-Paul	2	15, Rue de Lavaux, 54520 LAXOU
DEGRELLE Roger	3	13, Rue C. Desmoulin, BP 23, 54510 TOMBLAINE
DENIS Pol	4	5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR-le-DUC
GROSSMANN André	5	5, Rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM
GUILLAUME René	6	Ecole Pasteur, 54550 PONT-SAINT-VINCENT
KUENY Robert	7	11, Rue de Battenheim, BANTZENHEIM, 68390 OTTMARSHEIM
LEPEIX Jacqueline	8	82, Avenue Jean Jaurès, 67100 STRASBOURG
LUDWIG Edmond	9	26, Route de la Schlucht, STOSSWIHR, 68140 MUNSTER
NAU Marthe	10	6, Allée Marguerite, 57158 MONTIGNY-lès-METZ
REIBEL Laurence	11	5, Rue Ste-Barbe, RICHWILLER, 68120 PFASTATT
ROUX Catherine	12	"Horizon 2000", St. 323, 15, Rue Jacquinet, 54000 NANCY
SCHEIDEL Odette	13	35, Grand' Rue, 67660 BETSCHDORF
THIBIAS Jean-Luc	14	37, Rue Pierre Curie, 54500 VANDOEUVRE

1 informado - 2 vic-prezidanto kaj perkoresponda kurso - 3 libroservo - 4 vicprezidanto kaj redaktoro de LA INFORMILO - 5 kasisto - 7 sekretario - 9 prezidanto - 10 staĝoj kaj informado - 11 junularo - 12 ekzamenoj - 13 staĝoj kaj kontaktoj kun la lokaj grupoj - 14 libroservo

## NI KONGRESIS EN MULHOUSE

La 47a kongreso de la Orient-franca Kultura E<sup>o</sup>-Federacio okazis la 16/17ajn de aprilo 1988 en MULHOUSE.

Sabaton, la 16an de aprilo posttagmeze, post sia intervjuiĝo fare de lokaj ĵurnalistoj, Sr<sup>o</sup> Gunter BECKER montris videokasedon pri la lastaj paroladoj kaj la entombigo de Ivo LAPENNA. Poste li faris prelegon pri la temo: "Kiel mi fariĝis poligloto". Post la komuna vespermanĝo, Aline kaj Isabelle distris la kongresanaron per kantoj en Esperanto. Dum la paŭzo, Sr<sup>o</sup> GROSSMANN, kasisto de la Federacio, vendis aŭkcio brokantajn librojn.

La ĝenerala asembleo okazis dimanĉon je la 9a horo. Sr<sup>o</sup> LUDWIG, Prezidanto, transdonis la salutojn de Renée TRIOLLE, Claude NOURMONT kaj Sr<sup>o</sup> LIENHARD. La agadraporton legis la sekretario pri interna vivo de la asocio kaj komentis la prezidanto. Ĝi estis unuanime aprobita. La diskutado pri la financa raporto estis okazo por menciigi la malkreskon de la nombro de la abonantoj de "LA INFORMILO". Ankaŭ la financa raporto estis unuanime aprobita.

La bilanco pri la perkoresponda kurso montras, ke estas malpli da lernantoj, versajne ĉar anoncoj ne aperis en la gazetoj. 14 personoj lernas per la "Metodo 11" kaj 13 per la "Metodo 12" (2 finis). La kurso havas 12 kunlaborantojn, kaj 3 kromaj personoj helpas por aperigi komunikojn. Tiu raporto estis okazo por diskuti pri:

- = *niaj rilatoj al gazetoj. Estas konsilate mem fari artikolon, ne tro longajn, kaj meti en iliajn titolojn la vorton "Esperanto".*
- = *la manieron gardi en la Federacio la lernintojn. Ili devas havi kontaktojn kun esperantistoj kaj ĉiu devus havi respondecon pri io.*

Venis raporto pri la libro-servo. Estis propono, ke ĝi-mem eldonu librojn. La respondeculoj, Sr<sup>o</sup>j DEGRELLE kaj THIBIAS, provas aĉeti plej diversajn librojn (ankaŭ japanajn kaj ĉinajn), eĉ se tio limigas la nombron da ekzempleroj por ĉiu titolo. Sr<sup>o</sup> DENIS proponas, ke la lernantoj de la P.K<sup>o</sup>, je la kurs-fino, ricevu libron.

Venis la elekto de la komitatoj. La jenaj finis la periodon, por kiu ili estis elektitaj: Sin<sup>o</sup>j NAU kaj ROUX, Sr<sup>o</sup>j CLAUDEL, COLNOT, DAUTREVILLE, LUDWIG. Rekanidatiĝis Sin<sup>o</sup>j NAU kaj ROUX, Sr<sup>o</sup>j COLNOT kaj LUDWIG. Kandidatiĝis ankaŭ Sin<sup>o</sup> Odette SCHEIDEL. La kongresanaro unuanime elektis la kvin menciitajn homojn.

Sin<sup>o</sup> SCHEIDEL reprezentos la Federacion ĉe la Kongreso de UFE en ROUEN.

Post la renovigo de la komitato okazis diskuto pri la venonta agado:

- = *Sin<sup>o</sup> Scheidel telefonos regule al la grupoj por informiĝi pri la loka aktivado.*
- = *en Bar-le-Duc, estiĝas projekto (nuntempe studata): la tiel nomata "Institut des Forces de Ventos", ligita kun la Komerc-Cambro, intencus, en la kadro de la profesia formado de komercistoj, organizi jare specifan sekvencon pri Esperanto en la programo de la stago.*

= *pri la eksperimento en la mezlernejo de Villefranche-sur-Saône, estis menciite, ke Sr<sup>o</sup> Gilbert skribis al la Ministerio de la Edukado, nome de la Komerc-Cambro, kies Direktoro li estas.*

= *Oni rememoru la ekziston de informiloj: "L'espéranto, un droit à la communication" kaj "L'espéranto, ça marche!".*

= *estas propono, ke la Federacio provu produktigi "T-cemizojn" kun reklamo por E<sup>o</sup>.*

= *oni organizu specialajn aranĝojn por gejunuloj kaj decidu pri speciala kotizo por studentoj kaj aliaj senmonuloj, ĉe la federaciaj aranĝoj.*

= *oni konservu rilatojn kun eŭropaj parlamentanoj. Favoraj al E<sup>o</sup> estas multaj britoj kaj... unu franca! Necesas lokaj kontaktoj.*

La ĝenerala asembleo finiĝis je la 12a30.

Niaj gastoj havis la eblecon viziti la muzeon pri aŭtomobiloj kaj tiu pri surŝtofa presado.

raportis: Jacqueline LEPEIX

\*\*\*\*\*

## ANGULO DE LA SCIVOLEMULO

En pluraj E<sup>o</sup>-gazetoj aperas ofte, kiam temas pri literaturo aŭ esperantologio, la esprimo "ILTIS-a Skolo"... Ĉar nia bulteno, kiel elmontras ĝia nomo, celas informi, jen do la teksto de la "manifesto" de tiu certgrade freŝbakita skolo...

### LITERATURA MANIFESTO '87

Ni, esperantistoj, festas la signifan daton de la cent-jara jubileo de Esperanto. Kaj fakte temas pri evento vere celebrinda, ĉar ja io mirakla pulsas en la lingvo, se konsideri, ke de la momento mem de sia naskiĝo ĝi sukcese kapeis tra detruaj ŝtormoj kaj ĉio-renversaj uraganoj. Estas plej miriga kaj paradoksa fenomeno, ke ĉi ŝtormoj kaj uraganoj koviĝis ankaŭ en la esperantistaj medioj, t.e. en la sino de Movado, kiu levas la standardon de Esperanto kiel signon de interhoma paco kaj de universala frateco.

Ke Esperanto tamen ne splitiĝis en mil pecojn pro la negativa kaj miopa laboro de multaj esperantistoj, ŝuldiĝas unua-loke al la genia antaŭvido de Zamenhof. Li rigardis la literaturon baza premiso por la disvolvo de la lingvo kaj per siaj verkoj originalaj kaj tradukaj donis al ĝi la necesan koheron. La cent-jara tradicio beletra de Esperanto konstituas la rokon kontraŭ kies granitan mason frakasiĝis sinsekvaj generacioj de reformuloj de la sintakso, de la morfologio, de la ortografio kaj eĉ de la baza strukturo de la lingvo.

Cent jarojn post la naskiĝo de Esperanto, la ĝenerala situacio de la Movado esence prezentas la saman panoramon kiel en la fruaj tempoj. Nun, kiel tiam, la ekstera mondo plu ignoras nin aŭ maksimume nin rigardas sektanoj iomete folaj kaj iomete ridindaj. Nun, kiel tiam, oni proklamas denove la samajn argumentojn, jam mil-foje ripetitajn, por la totala esperantigo de propraj nomoj, por la ignoro de la gramatika karaktero de la radikoj, por la ŝanĝo de la aspekta verbo-sistemo al la tempa interpreto kaj por la enkonduko de alfabeto sen diakritaj signoj.

Aliflanke, kiel refo de la pratempa Esperanto, eĉ eminentaj esperantistoj plu tamtamas, ke pro la senfine vorto-krea kapablo de la afiksa mekanismo, la enkonduko de neologismoj estas nociva balasto por la lingvo, kvankam tion klare dementas la fina rezulto de multaj originaloj kaj tradukoj en Esperanto. Ĉi kulto al rudimenta lingvo tuj trovas favoran eĥon, ĉar tiaj esperantistoj flatas la intiman deziron de granda parto de la verda popolo, kiu volas uzi la lingvon nur kiel plaĉan hobion aŭ kiel simplan ludilon, montrante tiel kuriozan trajton de intelekta dikotomio pro tio, ke ili sentas nul ĝenon antaŭ la pompo kaj plentoro de siaj propraj naciaj lingvoj kaj aŭtoroj, nek antaŭ la senĉesa plimultigo de neologismoj en naci-lingvaj vortaroj, sed energie reagis kontraŭ la provoj doti Esperanton per tiom da esprim-eblecoj, kiom ĝi bezonas por konkurenci sur sama nivelo kun la naciaj lingvoj.

Lasta-tempe kelkaj famaj aŭtoroj, iam kreintoj de ne pokaj neologismoj, nekonsekvence pruntas siajn voĉojn al la ĥoro de partianoj de la hobia Esperanto. Tiel agis Baghy en la tridekaj jaroj, kiam li solidariĝis kun la amaso de eternaj komencantoj por bojkoti la tiutempe novan, kaj renovigan, lingvon de la genia Kalocsay.

Ĉar la kritikoj de la nunaj anatamantoj direktiĝas ĉefe kontraŭ la aŭtoroj originalaj kaj tradukaj, en poezio aŭ en prozo, kies plej signifaj verkoj publikiĝis/as ĉe la eldonejo Iltis, necesas prezenti la principojn de la membroj kaj simpatiantoj de la t.n. Iltis Skolo rilate la esperantan beletron kaj rilate la lingvon ĝenerale.

- 1 La Iltis Skolo fidelas al la reguloj de la Fundamento de Esperanto.
- 2 La Iltis Skolo inspiriĝas rekte en la artismo de la Budapeŝta Skolo kaj ĉefe de ties korifeo Kálmán Kalocsay.
- 3 La Iltis Skolo konscias, ke nia beletra, kaj nia lingvo entute, bezonas por sia plua evoluo kaj nuanca riĉiĝo daŭran enkondukon de neologismoj kaj de parolturnoj por familiaraj, vulgaraj kaj slangaj esprimoj. La Iltis Skolo daŭrigas tiel la tradicion riĉigi la lingvon laŭ la ekzemploj kaj la konsiloj de Zamenhof kaj de niaj plej brilaj aŭtoroj.
- 4 La Iltis Skolo laboras por progresemaj aŭtoroj kaj legantoj kaj atendas, ke ĝiaj kontraŭuloj konduku rilate al Esperanto kiel rilate al la propraj naciaj lingvoj, t.e., ke ili ne pretendu influi sur literaturon, kiun ili ne favoras, kaj legu nur tion, kio plaĉas al iliaj lingvaj kaj estetikaj preferoj.
- 5 La Iltis Skolo strebas uzi lingvon ĉiam pli riĉan, pli suplan, pli elvokivan, pli naturan, pli kapablan redoni al la tradukoj la tutan vivon kaj freŝon de la nacilingvaj tekstoj, kaj laboras kun la intenco fari ĝin multe pli taŭga kaj adaptebla al la originala verkado en Esperanto.  
La Iltis Skolo aspiras ĉefe esprimi sin plej klare, koncize kaj simple en la formo, eĉ se okaze la temoj ne prezentiĝas facilaj kaj simplaj. Ankaŭ la slava spirito de Esperanto pledas por stilo simpla, klara kaj konciza, kiel eminente montras la traduka genio de K. Bein (Kabe).
- 6 La Iltis Skolo ne povas preni serioze la protestojn de kelkaj aŭtoroj kontraŭ novaj vortoj, ĉar ili mem uzas ne pokajn neologismojn en kruda kontraŭdiro al siaj konfesataj konvinkoj, aŭ koncedas, ke oni uzu neologismojn, sed prudente kaj en etaj dozoj, kvankam ili neniam determinas, kiom la prudento permesas, kaj kiom devas esti la etaj dozoj.

\*\*\*\*\*

Kiel responsaj esperantistoj kaj aŭtoroj, la Iltis-skolanoj, gvidataj ankaŭ de sia artisma sento, tre bone konscias, ke la lingvo, pro sia specifa naturo, ne toleras troan akcelon evoluon sen risko de skismiĝo.

La Iltis Skolo turnas sin al esperantistoj, kiuj favoras ĝian pozicion, kaj invitas ilin subskribi ĉi Manifeston kaj kunaktivi kontraŭ la rutino, la inercio kaj la involuciaj tendencoj forte manifestiĝantaj, ankoraŭ en la cent-jara dat-reveno de Esperanto, en multaj verkoj originalaj kaj tradukitaj kaj en la kritikaj taskoj de kelkaj recenzistoj.

\*\*\*\*\*

Ĝis la komenco de Januaro 1988 la Manifeston subskribis:

B: Christian R. A. DECLERCK; Frans Van DOOREN.

BG: Mariana EVLOGIEVA.

C: Arnoldo AGUIZA; Andrés RODRIGUEZ.

CH: Claude GACOND; Henri VATRÉ.

CS: Jana CICHOVA; Jiří KAREN; Oldřich KNÍČAL; Věra ONESOR-KOVA; Karolo PIC; Josef RUMLER; Eli URBANOVA;

D: Günther BECKER; Arthur BENDERS; Adolf BURKHARDT; Josef DÖRR; Hans DORNER; Edith DUTTLINGER; Otto DUTTLINGER; Bernhard EICHKORN; Heiner EICHNER; Albert FEHR; Günter FEIS; Emil FEIST; Esther HAUPENTHAL; Irmtraud HAUPENTHAL; Reinhard HAUPENTHAL; Walter HEIDE; Ute HOEPPNER; Gunther HOTZ; Gebhard JOCHAM; Willibald KUHNIGK OSB; Heinz Dieter MAAS; Rudolf MARK; F.A. MEINERS; Richard REUCHLIN; Rolf H. RIEHM; Michael SCHERM; Oliver WALZ; Wilhelm WIEGEL.

.../...

E: Juan RÉGULO PÉREZ.  
 F: Bernard AUNIS; Norbert BARTHELMESS +; Francisko DEGOUL;  
 Pascal DUBOURG-GLATIGNY; Heidrun JANTZEN; JHOLO; Bruno  
 MASALA; Jérôme VACHEY; Gaston WARINGHIEN (aprobas princi-  
 pojn 1,2,3,5); Eugène de ZILAH; Madeleine de ZILAH.  
 H: Ada CSISZAR.  
 I: Luigi FRACCAROLI.  
 IS: Baldur RAGNARSSON.  
 J: Miekko SAKUDA.  
 M: Carmel MALLIA.

NL: Ed BORSBOOM; Wim DERKS; Els KERVERS-VAN THOLEN; P. H.  
 v. TERWISGA.  
 PL: Julia PIÓRO; Sławomir RUSZKIEWICZ.  
 S: Gösta PERSSON; Uno RENQUIST.  
 SU: Nadija ANDRIANOVA; Vladimir A. GLAZUNOV; Elvira LIPPE.  
 USA: Richard STAHL.  
 YU: Dušan ADNADJ.  
 YV: Fernando de DIEGO; Oscar de DIEGO.

SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt

\*\*\*\*\*



## mia unua "kafo-klaĉo"



La "kafo-klaĉo", kiu okazis la 6an kaj 7an de februaro en Germanujo, kunigis en simpatiplena etoso dudekon da junuloj el diversaj pli aŭ malpli proksimaj germanaj urboj (unu eĉ venis el Hamburgo!).

Diversnacia ĝi ja ankaŭ estis ĉar eĉ Anglano (eĉ se li loĝas nun en Germanujo..) ĉeestis ĝin, kaj mi-mem, Francino, riprezentis JEFO-n (depost nelonge mi respondecas pri la franc-germanaj renkontiĝoj ĉe JEFO).

La hajdelbergaj (el Heidelberg!) junuloj akceptis nin la sabatan posttagmezon en la kurvenejo de studenta internulejo. La "kafo-klaĉo" pludauris per ĝisnoktaj, kaj eĉ ĝismatenaj ludoj kaj kapdolorigaj enigmoj, en bonega etoso!

Tamen ne nur distraj aferoj okupis la programon de tiu renkontiĝo, ĉar dum ĝi oni serioze tralaboris la organizon de la programo de la Junulara Internacia Renkontiĝo, kiu okazos dum venonta somero en RASTATT (31.07 - 7.08.88). Ĝia temo: "Naciismo kaj Internaciismo en Eŭropo". Alloga estas la programo!.. Pri ĝi mi preferas ankoraŭ silenti... eble por scivolemigi vin...

Ni atendas multajn partoprenantojn, kaj mi ĉefe atendas reagojn de la junularo de nia Orient-Franca Federacio.

Je via dispono por pli da informoj!...

Laurence REIBEL



La 7an de aprilo okazis sur la ondoj de "Radio-Florival" (loka radiosendo centro de Guebwiller) elsendo, kies temo estis "La internacia Lingvo Esperanto".

Dum 2 horoj, Sr° BARRIER de la E°-Grupo de MULHOUSE detale kaj lerte prezentis Esperanton, klarigante ĝian historion, ĝiajn karakterizaĵojn, ĝian movadon, provante plie ĝian facilan kaj rapidan lernadon. Ankaŭ li bone elmontris ĉiujn avantaĝojn, kiujn ebligas ĝia lernado. Kompreneble li ne forgesis reklami por la perkoresponda kurso, kiun proponas nia Federacio. Mi-mem finfine aldonis kelkajn vortojn koncerne la junulara movado...

Ĉu ni sukcesis scivolemigi kaj eĉ ekkapti la intereson de la aŭdantoj de "Radio-Florival"... Tion la estonto diros al ni!...

Laurence REIBEL

\*\*\*\*\*



## ĈU VI DEZIRAS AKTIVI PER ESPERANTO POR "AMNESTY INTERNATIONAL" (A.I.)?

Ni dediĉos artikolon al tiu temo en nia venonta numero sed jam de nun vi petu informojn ĉe la sekvanta adreso:

LA MAISON POUR TOUS  
 "Esperanto Gironde"

Av. du Pdt Auriol F-33150 CENON



## GRAVA ALVOKO AL ĈIUJ LINGVO-INSTRUISTOJ!...

LASTMINUTE...

Ĝus atingis nian redaktorejon informo, kies graveco necesigas tujan reagon de niaj legantoj, kiuj instruas profesie lingvo(j)n. Ankaŭ iliaj kolegoj ne esperantofonoj povos alporti sian subtenon:

PRAKTIKE: Bonvolu sendi la ĉi-suban komunan leteron al la rektoro de LYON post subskribo, indiko de via nomo, adreso kaj instruata lingvo.

Kopion bonvolu sendi post indiko de via nomo kaj instruata lingvo al:

Monsieur le Principal

Collège JEAN MOULIN  
BP 291

69665 VILLEFRANCHE-sur-SAONE

.....

Monsieur le Recteur  
RECTORAT  
92, Rue de Marseille  
69000 LYON

Monsieur le Recteur,

Comme professeurs de langues nous avons suivi avec beaucoup d'intérêt l'expérience d'enseignement de l'espéranto au Collège de VILLEFRANCHE-sur-SAONE. Nous venons malheureusement d'apprendre que vous vous êtes opposé à la reconduction de cet enseignement.

A l'heure où la Langue Internationale se développe dans de nombreux pays, votre décision nous étonne. En effet, nous ne pouvons pas croire que la France se ferme à l'espéranto, au lieu de soutenir cette expérience menée dans votre académie avec un sérieux exemplaire. N'a-t-elle pas trouvé l'accord sans réserves des parents d'élèves de l'établissement?

Nous espérons que vous réviserez votre décision.

Recevez, Monsieur le Recteur, nos respectueuses salutations,

=====



**Internacia Esperanto-Konferenco 1988**

de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto  
en Metz, Francio


## GRAVA KONFERENCO EN METZ

En la pasintjara konferenco kiun Marjorie Boulton organizis en Barlaston (Anglujo), mia edzino kaj mi estis la solaj ne-anglalingvaj, tamen mi preskaŭ neniam aŭdis anglan vorton; sed tia estas la brita karaktero: ĉe ni oni diskutis franclingve pri la neceso ne krokodili; aliflanke de Maniko oni ne diskutas, oni kontentiĝas paroli Esperante.

Tial la Internacia Konferenco, kiu okazos en Metz de la 30a de julio al la 6a de aŭgusto estas grava evento, ebliganta al ĉiuj samideanoj de la Federacio plibonigi sian lingvon; ĝi meritas ĉies atenton. La ĉefa temo estos *Internacia kaj Naciaj Kulturoj sojle de la 2a jarcento de Esperanto*; sed ankaŭ ne mankos la kursoj por komencantoj aŭ progresantoj, la speciala programo por junuloj, ktp.

Kompreneble oni povos loĝi en komforta hotelo aŭ, tre malmultekoste, en gastdomo. Mi mem intencas profiti la okazon por viziti la urbon, kiun mi ĝis nun nur haste traveturis: min ege impresis ĝia urboplanismo, kie moderneco tre subtile akordiĝas kun eleganto. Kun iom da (ŝovina) bedaŭro, mi foje pensas, ke la belega monumento, farita de Jesper Neergaard por la urbo Graz, estus en Metz en multe pli taŭga loko.

Ĉiuj interesitoj povas por informiĝo skribi al: Madeleine de Zilah - 39, rue Joseph-Hénot - F - 57070 METZ



# ? U distra angelo



### KRUCVORTENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												
11												
12												

#### HORIZONTALE

1 ĝi kreskas sur la muroj (R) - Rifuzi - artiklo. 2 beligi (R) - ĝi floras dum la vintro (R). 3 atompezo 23 - kaĥelo (R). 4 premtordi (R) - malgranda simio (R) - pronomo. 5 ornama herbo - ĉefe administri - antikva dio. 6 balanceti - adverbo - serio. 7 admiru (R) - demanda adverbo - brusto (R). 8 la unua bestkolektigo - la 18a - gimnastikilo (R) - prepozicio 9 sonanta skrapante (R) - speciala akordo (R) - likviĝinta vaporo (R). 10 atente rigardi (R) - malgranda parto (R) - monero (R). 11 klara (R) - procedo de dekoracio (R) - streĉi fortojn. 12 nesalakva fiŝo - preni aŭ doni - mezurunuo de pezo (R).

#### VERTIKALE

1 majfloro (R) - la unua ĉefpastro de la Hebreoj. 2 perdi la ĝustan vojon (R) - por gvidi la ŝipon - insekto (R). 3 nepublika (R) - saltanta insekto. 4 malofta (R) - ne jesi - gimnastikilo - abstraktaĵo (R). 5 umbeliferaco (R) - monotone kantanta insekto - melodio. 6 birdonesto orkideo (R) - tranĉa aŭ pika (R) - por kapti la venton (R). 7 el ekstremo ĝis alia (R) - nenormala vidkapableco (R) - prepozicio. 8 por flari (R) - por manĝi - skrapi kampon. 9 ne distri, ne amuzi - dekreto, edikto - prepozicio. 10 sufikso - leŭso (R) ekrano. 11 organo (R) - granda birdo - montri gajecon (R). 12 sufikso - ĉilo - sufikso - ĝardeno floro (R).

#### SILABENIGMO

*Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.*

ab al blo cir de do eg ek eo et gio gle ib ido is iso ka kap ko ko kti la lo ma ma mf mi mo mo na na ne ni no no no of ono pri ra re reŭ ro se si sta ta ta ta to to tr ui ur

- 1 + - - + - - - - - tuto de dioj
- 2 + - - + - nepre pagenda ĉiujare
- 3 + - - + - - akvolilio
- 4 + - - + ne rara
- 5 + - - + - - neniigi
- 6 + - - + - - protektilo
- 7 + - - + - - - - - ankrolevilo
- 8 + - - + - serpentofajfo
- 9 + - - + - - mato
- 10 + - - + - - - - - dolora kongesto
- 11 + - - + - - - - - jara libro
- 12 + - - + - - - - - lasi nefarita
- 13 + - - + - sildo de Atena
- 14 + - + - - - - koncerto
- 15 + - - + - speco de areno
- 16 + - - + birdo
- 17 + - - + - - kanalo
- 18 + - - + - - - - - mambesto
- 19 + - - + - - religio



*Une jolie vue des rues de Betschdorf.*

#### SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ ("La Informilo" 60):

**KRUCVORTOJ:** holoturio cel ibero lando ru romb pendolo aliloke emajl konus seke rab orgeno astako not gui sorbi akra foti tono maori novigi klemo maniok volan ure val ok boluso rozo

**SILABENIGMO:** "Kiu cedas al siaj infanoj, ilin pereigas per propraj manoj"